# SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la ESPERANTO - FEDERACIO «Languedoc-Roussillon»
72, Avenue Général de Gaulle - 66000 PERPIGNAN ☏ (68) 34.22.18

JARA ABONO : 18 F C.C.P. Montpellier 956-28

1-a Kvaronjaro 1984 N° 88


# FEDERACIA KONGRESO

## en MILLAU 19-an kaj 20-an de Majo

Kvankam la programo ne estas definitiva(ĝi parte dependas de viaj sugestoj), jen kelkaj informoj:
Sabaton posttagmeze en Centre Culturel - Hôtel Pégayrolles (temas pri eks-hotelo nun muzeo) Place Foch de 14h ĝis 19h kaj20h ĝis 22h.

-Ekspozicio - Librobudo
-Renkontiĝoj - Konatiĝoj - Diskutoj
-Debato :"Preznti Esperanton per lumbildoj"-francling-ve se necese.
-Projekciado :"2 monatoj tra Esperantio" (J.Hénin)
-Prelego (franclingve): "Doktoro Zamenhof, bonfarinto de l'homaro" (R.Llech-Walter)
-Viaj kontribuoj.Dum la paŭzo, vespermanĝo en memserva restoracio.

Dimanĉon matene : de la9a ĝis 12h30 : jara kunveno en "Maison du Pèuple" -Agadraporto, planoj, nacia kongreso, ktp. Tiu kunveno okazos en granda salono(tutescepte la urbestraro disponigis la salonojn senpage pro la "nobla karaktero de Esperanto), ne hezitu veni centope!
Dimanĉon posttagmeze, post la kunveno, estas proponita la jeno: por nin aerumi pikniko sur la altebenaĵo kaj ekskurso. Ekzemple al Montpellier le Vieux (ne temas pri malnova urbo!),15km ekstere.Tie eblas pikniki, promeni, grimpi aŭ tagmanĝi en la gastejo(50F inkluzive vinon, aŭ prezo laŭ karto, je moderaj prezoj).Piknikontoj alportos sian akvon aŭ aĉetos trinkaĵojn surloke.Poste komuna veturado tra pitoreska regiono:Gorges de la Dourbie, Nant, Larzac, La Couvertoirade, Le Caylar.Tiu ekskurso povos nur efektiviĝi, se mi disponos pri sufiĉe da veturiloj.Do bonvolu zorge kompletigi la ĉi-suban enketilo kaj ĝin resendi antaŭ la 10a de Majo kaj plej frue por rezervi hotel-ĉambron.Alia ebleco estas turismi ĝis Roquefort kaj viziti ties fromaĝ-kelojn. (La fervojo apudas por reiri suden) aŭ simple restadi en Millau! La programo(escepte de dimanĉo matene) konvenas

por ĉiuj publikoj, viaj familianoj povas vin akompani. Pro la dato , ankaŭ eblas tendumi.Millau estas agrabla(25000 enl.) facile atingebla sur la nacia vojo 9, per aŭtobusoj aŭ trajnoj.Distancoj de Montpellier 110km, de Béziers 125km.

Por pli detalaj informoj(urboplano, hoteloj...) kontaktu J.Hénin Collège 48500 La Canourgue
Tel (66) 32 86 36

Gis!kaj sendu afrankitan koverton kun via adreso.
DANKON

# VIVO DE LA GRUPOJ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

## montpellier

La 17a de septembro okaze de nia la kunveno de la jaro, ni akceptis Eva Farkas el Budapeŝto kiu parolis al ni pri Hungario.

Nun grava problemo por ni: ni ne pli povas uzi la kutiman kunvenejon kaj ni ne scias kien iri.

6a Internacia Semajno en Sète:ĝi okazis de la 11a ĝis la 18a de septembro.Ĝi bone sukcesis.Ĉeestis 50 partoprenantoj el 6 nacioj (Usono, Svedio, Hungario, Hispanio, Francio).

Eva Farkas el Budapeŝto eminente gvidis la 2a-gradan kurson, nur en Esperanto komprenebla.Sro Ribot gvidis la 3a -gradon kaj Sinoj Authier kaj Mounier la 1a-.Ĉe la fino pli ol 10 kuraĝuloj trapasis ekzamenojn. Ĉiuj sukcesis, inter ili:2 skribaj partoj de l'atesto pri kapableco!

Ni telefonis al ĵurnalistoj de ambaŭ ĵurnaloj Midi Libre kaj Marseillaise).Ili venis kaj aperigis artikolon (bona!) kaj foton.

Jam estas rezervata la loko en Lazaret por la 7a Internacia Semajno ĉe Maro, kiu okazos de la 9a ĝis la 16a de septembro 1984.

Jam rezervu tiun semajnon!

## la canourgue

2 grupetoj funkcias en la kolegio de la Canourgue kaj liceo Chaptal de Mende.En 83 Sro Todorov vizitis ilin;li ankaŭ estis intervjuita tutan vesperon de loka radio-stacio pri sia lando (Bulgario)kaj E° . Venis nur telefon-alvokoj pri Bulgario...

Sro Hénin kun sia tuta familio faris 2 monatan rondvojaĝon tra centra Eŭropo lastan someron. La februaro numero de la revuo "Caravaning" raportis plurpaĝe pri tiu aventuro sub la titolo "Esperanto kiel kredo". Ankaŭ "Lozère nouvelle" raportis pri ĝi.

Krom prelegantoj de UFE, estas atendata finna familio en Junio.

## nimes

Sro Carrey instruas Esperanton en sia kolegio kaj ankaŭ al klaso de elementa lernejo (CM2).

Sro P.Touron gvidas promenadon tra la gariko por lerni medicinajn plantojn lundon la 14an de majo.Rendevuo je la 10h30 al la krucaĵo de la unua tervojeto, maldekstre post la "Pont St Nicolas".Prenu vian pluvombrelon.Ne forgesu vian malvarman manĝon kaj saketon por kolekti plantojn kaj tondilon aŭ iun tranĉilon(man-tranĉi la plantojn ne estas permesita!),kajereton aŭ malnovajn gazetojn, glupaperon.Tio sufiĉos!

Ĉiuj amikoj estos bonvenaj!

Kotizoj: Federacio Gard 5F
E° kultur rondo 10F
Sudfranca stelo 15F

Bonvolu ĝiri la tuton al : Cercle esperantiste de Nîmes CCP MONTPELLIER 1 665 10 K

# LABORTAGOJ en VALRAS - PLAGE

(Provizora programo)

Ili okazos de la 28a de Aprilo ĝis la 1a de Majo 1984
en Chalet Marie-Thérèse (centre socio-culturel, Ave de la République)
Valras-Plage (34).

**Sabaton 28 an de Aprilo**

Ek de la 10a : akcepto
12h30 : manĝo (el la sako aŭ laŭvole en restoracio
14h30 : laboro (diversaj kursoj ĉ 2 horoj)
17h30 : malstreĉo, promeno
19h : manĝo
20-22h: vespero, skeĉo, filmo, kantoj

**Dimanĉon 29an:**

9h30 : laboro
11h30 : malstreĉo, banado laŭ vetero
12h30 : manĝo kaj ripozo
16 : laboro
18 : ripozo
19h : manĝo
20-22h : vespero. skeĉo, filmo, kantoj

**Lundon 30an :** matene kiel dimanĉo
15h : laboro 18h : ripozo 19h : manĝo
20-21h30 : vespero (talentoj de la staĝanoj)

**Mardon 1an de Majo :**
9h30 : revizioj aŭ eventuale ekzamenoj
12h30 : manĝo
15h : konkludoj, opinioj de la staĝanoj pri tiuj labortagoj.

Jam, tiumomente pluraj restoracioj estos malfermitaj kaj kelkaj ne estas tro multekostaj.Se oni preferas oni povas manĝi en la staĝejo, alportante sian manĝon k manĝilaron.Ni rezervos dormoĉambrojn en hoteloj (indiku la "stelojn").Ebleco tendumi.Sed ne ĉiuj kampadejoj estos malfermitaj.

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

Korespondemuloj:

Korespondi kun eksterlando estas unu el la eblecoj, kiuj devigas vin regule skribi en Esperanto.Ĝi estas ankaŭ fenestro sur la mondo.

La "Koresponda Servo Mondskala", pli frue en Clermont-Ferrand, nun troviĝas en Nice, ĉe S-ro Robert Llorens -Les hortensias II, Domaine des fleurs, 121 bis, Bd Napoléon III- 06200 Nice.

Ĝi disponas pri multaj adresoj de eksterlandanoj, kiuj petas korespondantojn...Francio, Pollando, Hungario, Irano...

Sendu vian nomon, adreson, ktp kun 2 poŝt-markoj por ĉiu petata adreso.

# Iom pri Federacio Gard

La jara kunveno okazis la 22 an de Januaro en Nimo.
Ni plezure registris, ke gvidas kursojn en Nimo: Sino Volpelière, private ĉe sia hejmo, Sro Carrey en elementa lernejo kaj kolegio(36 gelernantoj), en Alès: Sro Pelletier ĉe la urba plenaera feriejo (Centre aéré) 8 gelernantoj, en kunlaboro kun simila kurso en Bilina (Ĉekoslovakio), urbo ĝemelgita kun Alès...al kiuj ni aldonas la ĉiusemajnan konversacian kunvenon ĉe Kultura Centro Pablo Neruda en Nimo.
La nima kultura klubo kaj la ales'a verda stelo starigis budon ĉe la forumo de la Asocioj.
La estraro :

| | |
|---|---|
| Prezidanto | S ro RAYNAUD |
| Vic prezidanto | Sro SCHLUMPF |
| Sekretario | Sro CORNUT |
| Help sekretario | Sro BOLLA |
| Kasistino | Sino SOULIER |
| Help Kasisto | Sro DUMAS |
| Membroj | Sroj TOURON; ANGEVIN,ALONSO, DALGON |

M E M O R U :-Universala Kongreso 21-29 VII en Vancouver Kanado . Revuo : ESPERANTO
-SAT Kongreso 1-8 VIII Bordozo .Revuo SENNACIULO
-Internacia Konferenco de la neŭtrala esperanta movado 22-28 VII Noordwiskerhout (Nederlando) Revuo :HORIZONTO

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

## K i o o k a z a s ĉ e n i a j n a j b a r o j ?

Okcidente: en Toulouse, ĥoro ĉiun semajnon sabate. Kursoj:3niveloj ĉ.s. Konversaciaj rondoj:la lan mardon kaj 3an merkredon de ĉiu monato.Ekskursoj: 1 IV - 29 IV - 17 VI - Staĝo :26an kaj 27an de Majo

Sude: Katalunio: de la 20a ĝis la 23a IV : Kataluna renkontiĝo en la Molina.
de la 31 V ĝis 3 VI : Konferenco de Esperantologio apud Barcelono.
de la 1a ĝis 8a VII : Unua internacia Esperanto ferisemajno en Vilanova i la Geltru (ĉemare)
de la 12a ĝis la 14a X : 20a Kataluna Kongreso en Olot.

Oriente: 23 III - kaj 16 IV: departementa kurso en Avignon
21 IV ĝis 24 IV : Sat Amikaro Kongreso en Draguignan
2 VI : Aix en Provence, studtago pri la instruado de Esperanto
3 VI :Pikniko en St Michel l'Observatoire
27-28 X : Literatura foiro en Avignon.

# Vu à la Presse

INDEPENDANT DES PYRENEES ORIENTALES

## Un bienfaiteur de l'humanité : le docteur Zamenhof

Tel est le titre de la conférence qui sera donnée mercredi prochain 15 février, à 17 h, au Palais des Congrès sous l'égide de l'association des Membres de l'ordre des Palmes académiques (A.M.O.P.A.) par M. René Llech-Walter.

Beaucoup de Perpignanais ne sauraient qui est le docteur Zamenhof si la municipalité en 1935, n'avait décidé, sur la proposition du professeur Charvet, de donner le nom de docteur Zamenhof, créateur de l'Espéranto, à une importante artère de Perpignan.

Sous l'occupation allemande la rue fut débaptisée mais dès la libération la municipalité Mercader fit remettre en place les plaques sur les murs du Palais consulaire et de la Grande Poste.

La vie du grand humaniste polonais comporte bien des péripéties heureuses et malheureuses, elle sera contée par René Llech-Walter dans le premier tryptique de sa conférence.



### Pour prendre date

Répondant à l'aimable invitation du président Rabinovitch, M. René Llech-Walter donnera le mercredi 15 février à 17 h au Palais des Congrès, une conférence sur "Un bienfaiteur de l'humanité : le docteur Zamenhof".

## A l'A.M.O.P.A. conférence sur Zamenhof

Elle a eu lieu mercredi dernier au Palais des Congrès.

MM. Rabinovitch et Léophonte ont présenté le commandeur et majoral René Llech-Walter avec toute l'amabilité et la courtoisie qui les caractérisent.

La vie du modeste médecin polonais fut contée avec beaucoup d'émotion par le conférencier.

Louis Zamenhof est né le 15 décembre 1859 à Bielostock, ville de Pologne où vivaient des éléments de quatre nations : Polonais, Russes, Allemands et juifs, chacun ayant son langage propre.

Cette diversité qui rendait difficile la vie de chaque jour tourmenta fortement l'âme de Zamenhof enfant. Il rêva alors d'une langue de l'Humanité ; ce rêve s'imposa à lui pendant toute sa jeunesse.

Elevé par une mère idéaliste qu'il adorait et un père travailleur acharné et d'esprit pratique Zamenhof subit ces deux influences et devint comme son père capable d'un labeur patient et d'une persévérance admirable et comme sa mère animé d'une foi indomptable plus forte que tous les échecs et que toutes les railleries.

Il connaissait le latin et le grec et apprit une dizaine de langues européennes.

Après bien des difficultés Zamenhof put enfin faire paraître, en 1887, le premier manuel d'esperanto en polonais, français, allemand et anglais qui fait le tour du monde.

La langue du docteur Esperanto (c'est le pseudonyme qu'il avait adopté) fait de nombreux adeptes et en 1905, le premier congrès universel d'esperanto se tenait à Boulogne-sur-Mer et c'est dans un enthousiasme indescriptible le triomphe de la langue universelle par la compréhension totale de tous les congressistes venus de nombreux pays.

Chaque année, les congrès vont se succéder avec le même succès aussi bien en Europe qu'en Amérique.

Le 2 août 1914, devait s'ouvrir à Paris, le 10e congrès universel d'esperanto.


Le docteur Zamenhof était déjà en route pour Paris quand survint la déclaration de guerre qui l'immobilisa à Cologne. Pendant des nuits entières il vit passer à travers le Rhin les engins de mort. L'image de la guerre se dressait devant ses yeux. Il arrivait trop tard lui et son rêve de paix et de fraternité. Quelque chose se brisa en lui.

Après un voyage épuisant de 8 jours, il regagna Varsovie par le Danemark, la Suède et Saint-Petersbourg. Il rentra dans son logis qu'il ne quitta plus.

Ce cœur qui avait battu pour que l'humanité vive en paix put supporter l'effroyable carnage et il cessa de battre le 14 avril 1917.

Après l'exposé sur la vie du docteur Zamenhof, le conférencier démontra l'utilité pratique de l'esperanto grâce au réseau de délégués-consuls dans toutes les villes du monde. Délégués des 10 Perpignanais qui avaient assisté au congrès universel de Budapest en 1983, Mme Payret, professeur de mathématiques et M. Fernandez confirmèrent le pouvoir absolu de communication internationale qu'apporte la connaissance de l'esperanto. M. Bénazet, professeur d'espagnol, appuya cette thèse par des exemples vécus, Mme Gouges, de Banyuls-dels-Aspres, nouvelle élève, dit toutes les satisfactions que lui apporte l'esperanto aussi bien sur le plan moral que pratique. Une roumaine espérantiste de passage à Perpignan, parla en esperanto et mit en valeur la belle sonorité de cette langue.

Une documentation fut remise en fin de séance aux auditeurs intéressés, par les délégués du centre culturel espérantiste de Perpignan où des cours gratuits sont donnés au siège, 72, avenue du Général-de-Gaulle.



## René Llech-Walter à l'A.M.O.P.A.

Malgré un récent accident (chute sur la chaussée, arcade sourcillière fendue, épanchement de synovie) M. René Llech-Walter sera présent au Palais des Congrès aujourd'hui mercredi à 17 h, où il donnera sa conférence sur "Un bienfaiteur de l'humanité, le docteur Zamenhof".

La première partie sera réalisée grâce au magnétophone, la deuxième permettra avec 10 Perpignanais qui ont assisté au congrès universel à Budapest en 1983 (5000 participants de 50 pays) de témoigner de la facilité de communiquer et la troisième verra le tableau blanc se noircir de la structure grammaticale de l'espéranto.

Entrée libre, documentation gratuite, bienvenue à tous.

*Les Sociétés culturelles catalanes ont le plaisir de vous inviter à assister à la conférence qui sera donnée le MERCREDI 15 FEVRIER 1984 à 17 heures au Palais des Congrès de Perpignan par M. René LLECH-WALTER sur*

*« UN BIENFAITEUR DE L'HUMANITÉ : LE DOCTEUR ZAMENHOF »*

*sous les auspices de l'Association des Membres de l'Ordre des Palmes Académiques.*

PERPIGNAN: sub la aùspicioj de "l'Association des Membres de l'Ordre des Palmes Académiques", Sro René Llch-Walter prelegis en "Palais des Congrès" pri : " Bonfarinto de l'homaro, Dro Zamenhof " .

## A l'A.M.O.P.A.
## conférence à trois volets

La conférence qui sera donnée mercredi 15 février, à 17 h, au Palais des Congrès, sous l'égide de l'Association des membres de l'ordre des palmes académiques (A.M.O.P.A.) comportera trois volets :
1. La vie du docteur Zamenhof (1859-1917)
2. Applications pratiques de l'espéranto
3. Structure grammaticale de l'espéranto (démonstration audio-visuelle)

Les personnes intéressées par l'espéranto recevront gracieusement une documentation.

**L'entrée sera libre et gratuite.**

!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!

Dum televida elsendo pri la ekonomia krizo, Christine Ockrent prezentis novan aparaton malpezan (500g), kiu ebligas, per premo de la elektita butono, tuj kompreni alian Eùropanon,kiu parolas al vi.

Post la elsendo oni tamen precizigis, ke tia aparato malfeliĉe estas fikcia.

Prefere uzu Esperanton;ĝi ne bezonas traduk-aparaton!

E k z e m p l a E s p e r a n t o - r o n d o . . . . .

...estas tiu de Heidelberg (Germanio).Tie Sro U. Ender (li estis lastjare en Montpellier) kaj Sro Deutsch (ambaù ĉeestis la lastan semajnon de Sète) gvidas kurson por 4 Germanoj, 1 Francino, 1 Hindo, 1 Cinino kaj 1 Japano.

**ALIĜILO** POR LA LINGVOSTAĜO en Valras-Plage du 28 avril au 1er mai au Chalet Marie-Thérèse (Centre socio-culturel), avenue de la République.

-:-:-:-:-:-:-

Familia nomo (Nom) Persona nomo(Prénom)
Aĝo (facultatif)
Adreso

Loĝado (logement) : Hotelo(hôtel) Kategorio
Mi mendas (je retiens) lito(j)n por la nokto(j) (pour la/les nuit(s)
Tendumejo (camping). Aranĝo surloke (arrangement sur place)
Ĉiu manĝos laŭvole (chacun mangera à son gré: restaurant, pique-nique)

Mi alvenos la (j'arriverai le) je la (à) h.

Kursoj (Cours) :
Mia nivelo estas(mon niveau est) : tout à fait débutant
Mi jam lernis Esperanton sed ne multe
Mi deziras pliprofundigi mian scion de Esperanto
Mi jam bone regas la lingvon
Mi deziras trapasi ekzamenon : jes - ne Kian?
Je désire passer un examen : oui - non Lequel ?

Respondu : Cercle Culturel d'Esperanto 9 rue Picot
34500 Béziers Tel.31-13-18
Aldonu koverton kun poŝtmarko, se vi deziras pliajn informojn.
Joignez une enveloppe timbrée si vous désirez d'autres renseignements.

Rimarkoj (remarques)

---✂--

**ALIĜILO** POR LA FEDERACIA KONGRESO EN MILLAU (La 19an kaj la20an de Majo)
Aliĝilo resendota plej frue, antaŭ la 10a de Majo
Indiku viajn respondojn per krucetoj ☒
Nomo
Adreso kun telNº
Mi aliĝas al la Kongreso de la Federacio Langvedoko-Rusiljono
Mi alvenos sabaton 19 mai ☐ dimanĉon 20 mai ☐
Mi venos per trajno ☐ (iu atendos vin, se vi indikas la horon de alveno)
per aŭtomobilo ☐
Bonvolu rezervi ĉambron por la nokto 19-20 mai ☐ (En kazo de malhelpo, mi informos vin minimume 48 h anticipe) por 1 persono ☐ por 2 personoj ☐ en la kategorio 65-80F ☐ 85-100F ☐ Pli ☐
Mi veturos aŭtomobile kaj povos transporti dimanĉon : 1 ☐ 2 ☐ 3 ☐ 4 ☐ personojn
Por la dimanĉa tagmanĝo mi piknikos ☐ mi mendas la tagmanĝon 50F (+ -) ☐ 1foje ☐ 2 foje ☐
Por la programo mi proponas

Aliaj rimarkoj



E S P E R A N T U J O .....

.....aŭ E S P E R A N T I O , pri kiu skeptikuloj sarkasmas, ekzistas:mi ĝin renkontis dum lastsomera rondvojaĝo.

Malvojaĝemuloj povas ĝin renkonti en siaj hejmoj, legante E° periodaĵojn (elstaras "Monato" kaj "El Popola Ĉinio" kiuj ne priskribas nur la movadon) aŭ aŭskultante radio-elsendojn (Bern facile kapteblas).

Iom pli kuraĝaj Esperantistoj regule ĉeestas la grup-kunvenojn, eĉ semajn finajn renkontojn (baldaŭ en Valras, 34 - kaj Millau, 12), nacian kongreson (Bourges 8-12 VI) aŭ tutsemajnan staĝon (La Chaux de Fonds, Grésillon)

Pli moviĝemaj antaŭvidas partoprenon al internacia kongreso, ne necese malproksime (ekz. la ferisemajno en Vilanova i Geltru, la amikeca kongreso de P. Delaire en Santiago de Compostela 15-21 VII, SAT Kongreso en Bordozo 1-8 VIII, Tejo Kongreso en Britujo, ktp).La semajno de Sète en septembro estas alia ekzemplo por montri ke ĉio ne disvolviĝas dum "la sezono".Ĉie okazas io en Esperantio.Informojn pri le ĉefaj eventoj vi trovos en la kalendaroj de "Heroldo" kaj "Monda Turismo".De via partopreno dependas la sukceso de la E° aranĝoj.

Kaj se vi preferas ĝui private nian lingvon, kontaktu la Esperantistojn sur la vojo de viaj ferioj.Tiel mi faris lastan someron, krom partopreno al diversaj renkontoj.Ĉie ni trovis amikojn en Esperantio.Ankaŭ eksterlandanoj ĝoje vizitus vin, se vi ne povas vojaĝi.

Eble vi estas Esperantisto, kiu ne praktikas la lingvon.Pardonu la tempoperdon,sed ne plendu,ke nenio povas vin allogi!

Al la aliaj, agrablan vojaĝon

en

E S P E R A N T I O !!!

J.Henin

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES

Dépot Légal : 1er Trimestre 1984

Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes